

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



EN LA NUMERO:

Vapcarov-
recitalo

15 P. I. F.

Juna espe-
-rantisto

Reeĥoj pri
nia jubileo

Memore al
Zamenhof

E-instruado

Virina agado

Nova literatu-
ra konkurso
de „BE“

Esperanto en
Afriko

Enlanda
movado

Sporto





Salutparolo de K. Valev ĉe "la solena" Inauguro de la Vapcarov-recitalo en Bansko

Eble vi volas
ĝin nenligi, ĝin — mian kredon
pri tagoj feliĉaj, ĝin — mian kredon,
ke morgaŭ fariĝos
la vivo pli bela,
la vivo pli saĝa.

Handwritten signature: K. Valev

KUN LA PATOSO DE LA REVOLUCIA VAPCAROV—POEZIO

Bansko benvenigis nin, partoprenantojn kaj gastojn en la Unua Nacia Recitalo-Konkurso de Vapcarov-Poezio en Esperanto, (22—23 10. 1982), per malofta por la aŭtuno suna kaj varma vetero. Tiu ĉi urbeto situanta en la piedo de la ĉarma Pirin-montaro brilas per la gloro de heroa pasinteco, per la grava kontribuo al la nova kaj plej nova historio de Bulgario.

Ne estas hazarde, ke ĝuste en Bansko naskiĝis la titano de la bulgara Renesanco Paisij Hilendarski, kiu ekbruligis la flamon de nia nacia konsciigo. La urbo estas naskiĝloko de la granda patrioto Neofit Rilski. Banskio denis al la mondo unu entuziasman poeton, batalanten por sociala justeco — la revoluciulon Nikola Vapcarov. Li ripetis la heroajn de la nacia heroo Hristo Botev per sia sinofero kaj per siaj versoj, neripetablaj laŭ beleco kaj revolucia potenco.

Vapcarov pereis en la disfloro de sia juneco kaj kreado. Neniu bulgara poeto ĝuas tian internacian popularecon, kiel li havas. La plej elstara bulgara poeto de l'kontraŭfasisma batalo dum la Dua Mondmilito, kiam oni solvadis la problemon — ĉu la barbareco aŭ la humanismo venkos, digne pereis en tiu giganta duelo. Post la venko super la bruna pesto la potenca monda movado por paco kaj amikeco danke prenis liajn verkojn sur siajn ondojn tra la tuta mondo.

La kristala morala pureco de la personeco de Vapcarov kun frapa precizeco estas spegulita en liaj versoj. La intima dialogo, la sincereco de l'konvinko kaj senkompromisemo en la konduto, la klara kaj streĉa logiko en

la pensoj kaj bildoj — tio estas la homo Nikola Vapcarov, por kiu la nocio „konscienco“ signifis altan devon antaŭ la homoj.

Naskita je la 24-a de novembro 1909 en Banskio, Vapcarov havis mallongan vivon — plenan je suferoj, batalo por la ĉiutaga pano kaj je politika streĉiteco. Post la finiĝo de sesa klaso en la gimnazio de urbo Razlog li ekstudis en la Marista Maŝinteknika Lernejo en Varna, kiun li sukcese finis en 1932. Poste Vapcarov laboris kiel maŝinteknikisto en la Bulgara Arbarindustrio en v. K. Ĵerinovo. Eksigita de laboro en 1935 pro politika agado, li enoficiĝis kiel teknikisto, kun 12-hora labortago kaj tro malalta salajro, en la fabriko de fratoj Bugarĉev en Sofio. Post tio Vapcarov laboris kiel lokomotivhejtisto en la fervojoj kaj en kadavrobruligejo. Tamen la polico jam observis lin kaj sekvis ĉiun lian paŝon. La poeto dediĉis ĉiujn fortojn al subfosa militagado en la rezista kontraŭfasisma movado. Tie li kunlaboris mallongan tempon. Oni arestis lin, terure torturis en la Direkcio de l' Polico kaj kondamnis lin je morto. Vapcarov estis pafmortigita je la 23-a de julio 1942 kune kun kvin aliaj elstaraj antifasistoj.

Nikola Vapcarov pereis, sed lia heroaĵo kaj poezio restas en la koroj. El la patoso de Vapcarov-poezio perceptiĝas je kio li kredis, kiun forton li opiniis garantio por la forigo de l'maljusteco. En la programversajo „Kredo“ estas spegulita ne nur la forta kaj riĉa personeco de la aŭtoro, sed ankaŭ la certeco de l'homo, ke ekzistas en la mondo nur unu justa politika forto — la komunista partio.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

DECEMBRO

12 • 1982

ANTAŬNOVJARAJ PRIPENSOJ

Pasis ankoraŭ unu riĉa je politikaj kaj kulturaj eventoj jaro por la bulgara popolo.

Ankaŭ la bulgaraj esperantistoj vigle kaj fervore ilin partoprenis kaj kontribuis al ilia realigo.

Oni solene celebris la 100-jaran datrevenon de la naskigo de la granda filo de nia popolo kaj elstara pachtalanto Georgi Dimitrov. Ĉiuj E-societoj okazigis kunvenojn lige kun la jubileo kaj la Bulgara Esperantista Asocio organizis specialan scienc-praktikan konferencon, en kiu partoprenis kun prelegoj kaj sciencaj raportoj ankaŭ alilandaj gastoj.

Multaj esperantaj arangoj en nia lando estis motivo, ke oni pli ofte parolu pri la Internacia Lingvo kun estimo kaj simpatio. La Revuo de la E-kanto kaj Parolo en Pleven, la internaciaj recitaloj de Botev-kaj Vapcarov-Poezio en Vraca kaj Banskio, la Konkurso de Originala kaj Traduka Poezio en Loveĉ altiris esperantistojn el la tuta lando, plivigligis la intereson de nia socio al Esperanto. Al tio kontribuis ankaŭ la ampleksa organiza agado de nia E-asocio, kiu okazigis dum la tuta jaro seminariojn por plibonigo de la organiza kaj instrua laboro de la distriktoj kaj lokaj Estraroj, por preparo de instruistoj de Esperanto kaj por plivigligo de la propaganda laboro por la Internacia Lingvo inter lernantoj en la ĉiusecaj mezlernejoj en la lando.

Grandan propagandan signifon kaj reĝon havis la organizita por unua fojo en Sofio Semajno de la Esperanta Kulturo lige kun la Dimitrov-jubileo. Ĝin partoprenis ne nur esperantistoj el la ĉefurbo, sed ankaŭ el multaj lokoj de la tuta lando.

La plej impona evento en la vivo de la bulgaraj esperantistoj ĉi-jare estis la preparlaboro kaj okazigo de la Scienc-Praktika Konferenco en Veliko Tarnovo honore al la 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio. Tiun gloran feston de nia organizado — unu el la plej malnovaj en la mondo — partoprenis ve-

teranoj kaj aktivuloj de la asocio kaj multaj eksterlandaj gastoj.

Per siaj altvaloraj prelegoj kaj salutparoloj la partoprenintoj en la jubilea festo multe kontribuis por la pliriĉigo de la 75-jara historio de BEA per novaj faktoj.

Karaj legantoj!

Ni estas ĉe la sojlo de la Nova 1983 jaro.

Nin atendas serioza kaj obstina laboro por plua propagando kaj disvastigado de Esperanto en nia lando. La asocia plano por 1983 enhavas novajn interesajn arangojn, ankaŭ en tiu ĉi jaro okazos la jam tradiciaj E-recitaloj, revuoj kaj renkontigoj, oni turnos specialan atenton al la organiza kaj instrua laboro, al la preparo de E-instruistoj, al disponigo de sufiĉe da instruhelpiloj kaj altiro de pli multaj gejunuloj al la vicoj de la bulgara esperantista movado.

En 1983 oni celebros la 60-an datrevenon de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en Bulgario, al kiu la bulgaraj esperantistoj kaj nia revuo dediĉos multajn arangojn kaj materialojn. La nova literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ estas dediĉita al tiu glora datreveno kaj la redakcio atendas viajn originalajn E-verkojn.

La bulgaraj esperantistoj daŭrigos sian batalon kontraŭ la minaco de la imperiismaj militemuloj neniigi la homan civilizon per novaj teruraj nukleaj armiloj. Per tiu ĉi sia agado ili aligos al la pacamaj fortoj de la planedo.

La monda esperantistaro partoprenas la realigon de larĝskala programo lige kun la antaŭstaranta festado de la 100-jara jubileo de la Internacia Lingvo Esperanto. Ankaŭ la bulgaraj esperantistoj preparas sian propran programon por tiu jubileo, kiu estos ilia valora kontribuo al la plua popularigo de Esperanto.

La Nova 1983 estu jaro de amikeco kaj interkomprenigo inter la popoloj!

Ĝi estu paca kaj fruklodona por ni ĉiuj!

VAPCAROV—RECITALO

(daŭrigo de paĝo II)

La Unua Nacia Recitalo-Konkurso de Vapcarov-Poezio en Esperanto kunvenigis ĉirkaŭ 250 recitantojn, kantistojn kaj gastojn el 20 loĝlokoj de Bulgario, el kiuj la programon partoprenis reprezentantoj de 17 loĝlokoj.



Kantgrupo el Burgas

Vendrede vespere oni renkontigis en la junulara klubejo „Rodina“ (Patrolando) kun eksgeneralulo Krum Radonov, persona amiko kaj kunbatalanto de Vapcarov, partizana komandanto kaj popola deputito. Emocie Radonov rakontis memorindajn epizodojn el siaj renkontigoj kaj kontaktoj kun la poeto. La ĉeestantoj eksciis iujn nesufiĉe konatajn faktojn el la modesta vivo de l'granda poeto-revoluciulo.

La sekvan tagon antaŭtagmeze oni metis florkronon antaŭ la monumento de Vapcarov en la centro de Bansko kaj klinigis antaŭ lia memoro. Poste la 250-persona homamaso direktigis al la belaspekta kaj bone aranĝita kulturdomo, kie okazis la recitalo.

Sur la feste ornamita scenejo aperis k-do Kunĉo Valev, ĝenerala sekretario de BEA, kiu parolis pri la gravaj celoj de la aranĝo kaj salutis la ĉeestantojn je la nomo de Centra Estraro de BEA. Ing. Ljuben Stefanov, sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio, bondeziris la altnivelan okazigon kaj estontan internaciigon de la Vapcarov—Recitalo.

La entuziasmo de la plenumantoj estis karakteriza trajto. Sur la scenejo aperadis infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj, kiuj

pasie kaj ambicie recitis kaj kantis. Tutan tagon sonis la flamaj revoluciaj vortoj de Vapcarov. Aparte elstaris la recitaj plenumoj de Daniela Sirakova (Gorna Orjahovica), Gjulten Kerimova (Targoviŝte), Junpionira Ensemblo — Targoviŝte kaj la originala muzika sinprezento de la Ĥoro kaj Kordinstrumenta Orkestro — v. Gorno Dragliŝte (Blagoevgrad-distrikto). Vespere okazis koncerto de la premiitoj kun plenumoj de Angelina Sotirova, Maria Angelova, Dimitar Denĉev, Radka Malamova (ĉiuj el Sofio) kaj la popola kantisto Dimitar Kolarov el Petriĉ.

Evidentiĝis denove iuj malnovaj mankoj kaj malperfektaĵoj de nia E-artagado: malfrua komencigo de la preparlaboroj, ne-utiligo de kompetentula helpo (reĝisoroj, muzikistoj, artistoj kaj spertaj lingvokonantoj), foresto de konkurso pri oratora arto.

Do, ni batalu konscie kontraŭ niaj mankoj, por ke ili vere ne ripetigu. Tio ne restu nur bondeziro, sed ankaŭ efektiva strebo antaŭen, por ke la estontaj recitaloj de Vapcarov-poezio en Esperanto pliriĉigu arte kaj enhave. Ili fariĝu tradiciaj festoj de la flama kaj senmorta revolucia poezio de Nikola Vapcarov.

Bansko — Sofio

Evgeni GEORGIEV



Ĥoro kaj Kordinstrumenta Orkestro el v. Gorno Dragliŝte

LISTO DE LA PREMIITOJ

EN LA UNUA NACIA RECITALO-KONKURSO DE VAPCAROV-POEZIO

RECITADO

INDIVIDUAJ PREMIOJ

1-8 KLASOJ

- I Anelija Koeva — Gorna Orjahovica
II Gjulien Kerimova — Targovište
III Teodora Jordanova — Pazarĝik
Silvija Asparuhova — v. Ljulin, Pernik-distrikto

9-11 KLASOJ

- I Daniela Sirakova — Gorna Orjahovica
II Angelina Gjurova — Plovdiv
III Liljana Pavlova — Pazarĝik
Nadejda Bončeva — Sofio
Kuragigaj: Conka Staneva — Ruse
Liljana Jabilova — Trojan
S'ojanka Dimitrova — Sofio

GEJUNULOJ KAJ PLENKRESKULOJ

- I Petranka Milanova — Sofio
II Nikolina Takova — Ĉepelare
Grozdenka Filipova — Pazarĝik
Nastenska Angova — Blagoevgrad
III D-rino Tjuran Omer — Loveč
Nevena Dočeva — Varna
Stefka Sirakova — Plovdiv
Kuragigaj: Venelina Angelova — Varna
Marin Iliev — Varna

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

1-8 KLASOJ

- I Junpionira Ensemblo — Targovište
II Junpionira Ensemblo — v. Ljulin, Pernik-distrikto
Kuragigaj: Junpionira Ensemblo — Haskovo

KANTADO

INDIVIDUAJ PREMIOJ

Dobrinka Todorova — Miĥajlovgrad

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

1-8 KLASOJ

Kuragiga: Ĥoro — Bansko

9-11 KLASOJ

I Ĥoro — Petrič

GEJUNULOJ

III Ensemblo de engaĝitaj kantoj „Ruĝa Oktavo“ — Blagoevgrad

Speciala premio: Ĥoro kaj Kordinstrumenta Orkestro — v. Gorno Draglište — Blagoevgrad-distrikto

KOMPONADO

PLENKRESKULOJ

I Dimitar Denčev — Sofio

II Petja Janeva — Burgas

POR BONA ARTLABORO KUN KOLEKTIVOJ

Ivan Apostolov — Petrič

Georgi Durev — v. Gorno Draglište — Blagoevgrad-distrikto

POR BONA ORGANIZA LABORO

DUM LA RECITALO

Elena Stojkova — Burgas

Dimitar Petkov — Gorna Orjahovica

JURIO: Prezidanto: Kunčo Valev

Membroj: Maria Angelova

Angelina Sotirova

Snejana Jopeva

15. PIF

La Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) fariĝis jam tradicio. Por 15-a fojo la bela kaj pitoreska urbeto Velika Gorica, situanta apud Zagreb en Jugoslavio, kunvenigis de la 6-a ĝis la 11-a de oktobro j. k. pupartistojn kaj infanojn-esperantistojn el multaj landoj.

En la granda salono de la urba legejo „Juraj Kokot“ kaj en la malgranda halo en la Domo de Kulturo dum kvar tagoj kolektigis aktoroj kaj publiko — por doni kaj ricevi artan plezuron. Dum kvar tagoj en la Klubejo de PIF kolektigis plenkreskuloj kaj infanoj el diversaj landoj, unuigitaj de la sama lingvo kaj ideo. Tie, en la festivala klubejo, realiĝis multaj kontaktoj kaj amikecoj.

La festivalon partoprenis tri pupteatroj el Jugoslavio, pupteatroj el Norvegio, Hungario, Hindio, Italio, Rumanio kaj unuopaj artistoj, reprezentantoj de Anglio, Italio, Jugoslavio.

La artistoj malfermis siajn kofrojn kaj

eltiris el ili diversajn pupojn, kiuj ekvivis en iliaj manoj. Homoj, bestoj, birdoj komencis paroli, plori, ridi, danci aŭ batali unu kontraŭ la alia. . . Dolĉa kaj delikata, la Snurdancistino el la prezentaĵo de Tivolir-kus (Norvegio) estis savita de la brava Blans, kiu amis ŝin. La infana publiko estis ravita de la du bonegaj artistinoj, kiuj plenumis per la pupoj ĉiujn rolojn.

Cu oni povus prisilenti pri Punĉ? Kiu li estas?! . . . Punĉ estas la ĉefrolulo en „Punĉ kaj Gudi“ — la teatraĵo gajninta la Grandan Premion de la Internacia Infana Ĵurio. Fakte, ĝin gajnis Percy Press el Londono, kiu ludis ĉiujn rolojn en sia teatraĵo kaj montris al la publiko la tradicion anglan teatron — belan kaj amuzan.

La infana ĵurio konsistis el infanoj el Jugoslavio, Hungario kaj Bulgario (sep infanoj el Sofio, Petrič kaj Haskovo).

La infanoj alte taksis ankaŭ la prezentaĵon „Sinziana kaj Pepeles“ de la rumana pup-



Percy Press — Londono, gajninto de la premio de l' infana juro.

teatro. Interesaj estis ankaŭ la spektakloj de la jugoslavaj kaj italaj artistoj.

Riĉa kaj varia estis la festivala programo. Diversaj trupoj, diversa ludmaniero — tradicia aŭ moderna, interesaj ideoj kaj vidpunktoj pri scenografio, lumado, muzikaj efektoj. La bona E-parolo sur la scenejo ĝoji-

gis la publikon. Bedaŭrinde, ne ĉiuj aktoroj povis tiel bone konversacii en Esperanto kun siaj amikoj, kiel iliaj pupoj sur la scenejo... Malgraŭ tio ni dankas ilin, ĉar per sia arto ili propagandas la E-kulturon.

Interesa estis la vivo de la partoprenantoj dum tiuj kvar tagoj. La lastan tagon okazis la solena fermo: oni disdonis la premiojn, la emociita publiko ŝtorme aplaudis siajn ŝatatajn artistojn kaj pupojn kaj spektis ankoraŭfoje la teatraĵon „Punĉ kaj Gudi“.

Multe da floroj, multe da premioj, multe da aplaŭdoj. Kaj jen, la organizantoj anoncas la fermon de PIF. La publiko eliras el la salono, la infanoj serĉas la artistojn por ricevi iliajn aŭtografiojn sur siaj afiŝoj, por tuŝi ilin aŭ por diri al ili kelkajn vortojn, por danki al ili pro la plezuro.

Finigis la festo... Ciu ekveturis al sia hejmo kun koro plena de impresoj, kunportante la rememoron pri novaj amikoj kaj interesaj kontaktoj.

Gis revido dum la sekvonta PIF — tio certe estas la deziro de ĉiuj partoprenintoj.

Mariana ELENŌVA

Juna Esperantisto

SUKCESA JUNULARA SEMINARIO

Ci-jare la Bulgara Esperantista Asocio solene festis grandan jubileon — la 75-jariĝon de la asocio. La bulgara esperantista junularo ne restis flanke de tiu granda okazintaĵo. De la 8-a ĝis la 10-a de oktobro en vilaĝo Pisanica, en la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) la estraro de la Junulara Sekcio ĉe BEA organizis nacian junularan seminarion, dediĉitan al la hela datreveno. La temo de la seminario estis „La junulara Esperanto-movado ekde la fondiĝo de BEA ĝis nun.“ Partoprenis 40 gejunuloj el la tuta lando. Karaj gastoj de la seminario estis ing. Petar Todorov — vicprezidanto de BEA, ing. Angel Todorov — ĉefdirektoro de IEK, s-ino Toleva — direktorino de IEK.

Ĉefraporton pri la historio de la Bulgara Esperantista Asocio faris P. Todorov. Li ankaŭ parolis pri la partopreno de bulgaraj junuloj en TEJO. Tre interesa estis la temo de Dimitar Petrov, kiu informis la partoprenantojn, en la seminario pri la vivovojo kaj la esperantista agado de subkolonelo Diĉo Petrov kaj de Vela Peeva, kiuj fordonis sian junecon kaj vivon en la batalo kontraŭ monarkofaŝismo en nia lando. Iliaj nomoj estiĝis legendo kaj ĉiam inspiros per sia

heroa vivo niajn junajn esperantistojn.

La raporto de Evgeni Georgiev prezentis la evoluon de la bulgara E-movado post la venko de la socialisma revolucio.

En la seminario oni pridiskutis diversajn junularajn problemojn. Stela Dimitrova — prezidantino de la Junulara Sekcio ĉe BEA, parolis pri la Internacia Infana Asembleo, okazinta ĉi-jare en nia lando. La Asembleon partoprenis ankaŭ kelkaj infanoj-esperantistoj.

Vigla disputoj okazis pri la problemoj de la junulara aktivado. Oni proponis diversajn interesajn aranĝojn por la venonta jaro. La ĉefa konkludo estis, ke oni devas pli aktive kunlabori kun la Komsomolo kaj kun aliaj sociaj organizaĵoj. Ĉar tiu kunlaborado estas la decidiga faktoro por prospero de la junulara Esperanto-movado. En Pisanica la gejunuloj ne nur kunsidis, sed ankaŭ amuziĝis. Vespere je ilia dispono estis la moderna diskoteko de IEK. La mara oficiro Georgi Dimitrov, loĝanto de Pisanica, prezentis lumbildojn de foraj landoj: Tajlando, Indonezio, Aŭstralio ktp.

Dimitar IVANOV



REEĤOJ PRI NIA JUBILEO

Lige kun la 75-jara jubileo de BEA al ni skribis multaj gesamideanoj el eksterlando, inter ili Imre Petthes (Hungario), Josif Portnoj (Sovetunio), Milorad Ĝurĝević (Jugoslavio) kaj s-ino Adda Sakellaropoulou en la nomo de Atena E-societo de Heleninoj kaj de la Supera Helena Esperanta Instituto. Ĉi-sube ni donas lokon al iliaj leteroj:

D-ro IMRE PETTHES,
prezidanto de MEM

Kun granda ĝojo mi ricevis la inviton festparoli en „Pacvespero“ en Polski Trambes. Survoje ni konstatis, ke en multaj loĝlokoj ekzistas esperantistaj kluboj aŭ rondetoj, kiujn bedaŭrinde pro manko de sufiĉa tempo ni ne povis viziti.

Alveninte en Polski Trambes, mi vidis ke multaj afiŝoj sur la muroj kaj en preskaŭ ĉiuj montrofenestroj invitis la loĝantojn partopreni la Pacvesperon, kie mi devis plenumi, kompreneble tre volonte, mian honoran taskon.

Nia kara amiko Hristo Manolov atendis nin ĉe la ĉefplaco de tiu urbo kaj dum nia vizito tre afable zorgis pri ni. Post la amika bonvenigo kaj enloĝigo en pitoreskan motelon, komenciĝis la riĉa, neforgesebla programo. La 23-an de septembro vespere en amika rondo ni renkontiĝis kun la anoj de la urba esperantista societo kaj kun la prezidanto de la urba packonsilio. Ni interŝanĝis opiniojn pri la aktualaj pactemoj kaj homaj problemoj, ni ricevis novajn bonegajn impresojn pri la fama amikemo de la bulgaroj.

Post la longa vojaĝo ni bone ripozis en la komforta tranoktejo kaj la sekvontan matenon ni renkontiĝis kun la oficialaj personoj de la urbo kaj kun la ĉarma raportistino de la loka radiostacio, kiu intervjuis min. Sin interesis precipe miaj impresoj pri Bulgario kaj la agado, rezultoj kaj plej gravaj taskoj de MEM.

Reveninte en Polski Trambes, ni renkontiĝis kun aliaj eksterlandanoj el Ĉeĥoslovakio, Francio, FRG, GDR, Hispanio, Italio, Jugoslavio, Sovetunio, Turkio. La urbestro donis al ni tre interesan informon pri la vivo de la loĝantoj, pri la lokaj industrio kaj agrikulturo... Ni metis florkronon sur la monumenton de la herooj, oferintaj sian vivon por la libero de la bulgara popolo.

Kun riĉaj kaj bonaj impresoj ni adiaŭis Polski Trambes por partopreni la Scienc-Praktikan Konferencon dediĉitan al la 75-a datreveno de la fondiĝo de BEA en la pitoreska historia urbo Veliko Tarnovo, kiu iam estis la ĉefurbo de Bulgario. La granda kaj belega nova universitato „Cirilo kaj Metodjo“ proponis bonan eblecon ne nur por

konferenci, sed komforte restadi. Ĉiuj partoprenintoj ricevis belan insignon kaj saketon kun diversaj sciindaĵoj, broŝuroj kaj valoraj libroj abunde.

La referaĵoj de la konferenco donis bonan resumon pri la 75-jara historio de BEA ekde ĝia fondiĝo ĝis la nuna tempo. El ili oni povas ekscii, kiel estis uzata la Internacia Lingvo por la celoj de la laborista movado kaj kiel ĝi servis la interkonatigon inter la popoloj; ili klarigis kiel bonuzebla rimedo estas la internacia lingvo en la nuna tempo por la kulturaj, pacaj celoj. Oni povas konstati, ke la bulgara esperantista movado havas bonan kunlaboron kun ĉiuj ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj, pro tio ĝi estas organika parto de la bulgara socia organismo. La metodoj, kiujn aplikas la bulgaraj geesperantistoj — penetri en ĉiuj sociaj tavoloj, evoluigi la interesigon kaj kulturon de la homoj, subteni kaj trovi kontakton kun alilandanoj, interŝanĝi opiniojn pri la homaj problemoj — estas por ni sekvenda modelo. En Veliko Tarnovo la konferenco proponis al ni krom la scienca temo multajn vidindaĵojn, ekzemple: trarigardo de la urbo, akcepto ĉe la urbodomo, koncerto kaj diversaj prezentaĵoj esperantlingve kun popoldancoj.

Granda surprizo estis por ni vidi tiom grandan socian kunlaboron en Dolna Orjakhovica, kie oni renovigis la naskiĝdomon de la pioniro de bulgara Esperanto-movado Hristo Popov. Estis aparta ĝojo por ni ricevi tiun amikan gastigadon fare de la loĝantoj de tiu ĉi urbeto.

Ni povis longe rakonti pri la multkoloraj impresoj kaj travivaĵoj dum la postkongresa ekskurso. Tamen ni devas akcenti la belajn de Arbanasi, Etar, Drjanovo-monaĥejo kaj Vitoŝa. Estis kortuŝa la amika akceptado en Gabrovo, same la sofiaj geesperantistoj volis superi ĉion, kio okazis en la antaŭaj tagoj.

Tial malfacila estis la adiaŭo de bela Bulgario, de ĉiuj geamikoj... Sed la koloraj bildoj, prospektoj, libroj konservas la memoron kaj la sincerajn homajn kontaktojn kaj amikecon!

Mi deziras esprimi mian profundan dankon al la gvidantoj de BEA — kamaradoj Hristo Gorov, Nikola Aleksiev, Hristo Kanev, kiuj donis al mi la eblecon dum la Scienc-Praktika Konferenco en urbo Veliko Tarnovo, dediĉita al la 75-jara jubileo de BEA fari raporton pri la internaciaj kontaktoj inter la laboruloj el Soveta Kazahstano kaj Bulgario.

La riĉenhavaj kaj interesaj raportoj kaj sciigoj de la partoprenantoj en la konferenco prezentas grandan politikan kaj sciencan intereson.

Tiuj ĉi raportoj estas penetritaj de la ideoj pri pachtalo, de la spirito de proleta internaciismo kaj amikeco inter la popoloj.

Mi opinias, ke la starigita antaŭ la Konferenco tasko — kontribui por la stabiligo de la internacia klasa solidareco en la batalo por paco kaj sekureco de la popoloj — estas sukcese plenumita. Al tiu ĉi celo servis ankaŭ la organizitaj kun partopreno de la alilandaj delegitoj kontraŭfasiŝtaj kunvenoj kaj mi-

MILORAD ĜURĜEVIĆ, Jugoslavio

Karaj bulgaraj amikoj!

Salutante vin, samtempe mi dankas al vi pro la neforgeseblaj tagoj pasigitaj inter vi dum la festado de la 75-jara jubileo de BEA. Mi rakontis al miaj parencoj, amikoj, samideanoj kaj al aliaj konatoj pri mia restado en Bulgario. Eĉ mia edzino rakontis pri miaj impresoj al siaj kolegoj. Jam du E-societoj — „Stari Grad“ kaj „Radomir Klajić“ en Beograd enmetis en siajn novembrajn programojn prelegojn pri miaj impresoj. Mi transdonis de vi ricevitaĵojn librojn kaj insignon al ambaŭ societoj kaj ili tuj enskribis ilin en la liston de siaj bibliotekoj.

Mi ĉi tie ne mencias nomojn de la personoj, kiuj impresis min, ĉar la listo estus longa kiel listoj de la aktivuloj el Polski Trambes, kiuj kolektis subskribojn kontraŭ la milito. Tiuj, kiuj ne konas sufiĉe bone la bulgaran

ADDA SAKELLAROPOULOU, Greklando

Trovigante en Sofio, ni tre bedaŭris, ĉar ni ne povis ĉeesti vian celebradon, kiun ni imagas impona. Pro ege urĝa afero ni devis reveni al Ateno. Tial ni sendas tiun ĉi leteron, per kiu ni kore salutas vin, transdonante ankaŭ la salutojn de niaj membroj el E-societo

tingoj de la laboruloj en produktadkombinumo „Malĉika“ en Sofio, en Polski Trambes, Dolna Orjahovica kaj Gabrovo.

Neforgeseblaj estas miaj impresoj pri la renkontoj kun bulgaraj amikoj, pri mia konatiĝo kun la antikva kulturo de Bulgario kaj ĝia socialisma vivmaniero. Ili estas bazo por la libro „En frata unuiĝo“, kiun mi intencas verki kaj en kiu mi rakontos pri la internaciaj kontaktoj de la kazaha kaj de la aliaj popoloj de USSR kun Bulgario, pri iliaj profesiaj unuiĝoj. En la libro mi atentigos pri la rolo kaj la graveco de Esperanto por starigo kaj disvolvigo de tiuj ĉi kontaktoj. Por elserĉado de la necesaj materialoj por la libro multe helpis min la veterano de la komunista kaj sindikata movado en Bulgario, la heroo de socialisma laboro, la granda amiko de la soveta popolo Nikola Aleksiev, al kiu mi esprimas apartan dankon. Mi dankas ankaŭ al Veselin Rizov, Dimitar Papazov, Marin Bacev, Ljuben Grozdanov, kiuj multe kontribuis por la utila kaj agrabla restado en Bulgario de la alilandaj partoprenantoj en la konferenco.

Mi ne adiaŭas, mi diras: „Ĝis revido, bulgaraj amikoj! Ĝis novaj renkontigoj!“

popolon kaj kiuj hazarde okupis mian lokon dum la konferenco de la komenco ĝis la fino, eble suspekto skuus la kapon, opiniante ke montritaj ĝentileco kaj bonkoreco de la gastigantoj estas nura afableco.

Mi, kiu spertis varman koron de la bulgara popolo en 1945, kiel unu el 13 500 jugoslavaj infanoj suferintaj dum la Dua Mondmilito kaj poste renkontojn kun bulgaroj en 1977 kaj 1979 en Hungario, en 1981 en Pisanica kaj ĉi-jare en Velingrad, sufiĉe bone konas virtutojn kaj aliajn ecojn de la bulgaroj.

Ne estas hazarde, ke bulgaroj okupas la unuan lokon inter miaj korespondantoj kaj veraj amikoj.

Baldaŭ mi komencos gvidi unu aŭ du kursojn kaj mi ne hezitos rakonti al la kursoj pri la beleco de Bulgario, pri la vigla kaj forta bulgara E-movado...

Varmkore mi salutas ĉiujn vin, karegaj amikoj!

de Heleninoj kaj de la supera Helena Esperanto-Instituto.

Ni esprimas nian varman deziron, ke via celebrado fariĝu unu nova starto, per kiu vi atingu novajn konkerojn aldone al la ĝis nun faritaj, vere mirindaj, kiuj prezentas vian movadon kiel imitinda modelo.



La 5-a de aŭgusto 1905 estis granda tago en la historio de Esperanto.

El tridek landoj de la nova kaj malnova kontinentoj alvenis en la malgrandan francan urbon Boulogne-sur-Mer al la invito de la tiea esperanta grupo ĉirkaŭ milo da diversnaciaj esperantistoj.

Multaj el ili dum la longa vojaĝo certe ne estis liberaj de timo, simila la tiu, kiun devas senti elpensuloj kaj eltrovistoj, kiam ili unuan fojon faras praktikan elprovon de maŝino aŭ aparato, rezultato de iliaj longaj penoj kaj laboroj. Kio okazos, se ĝi ne funkcios, se ĝi ne taŭgos por sia difinita celo?

Sed ĉiuj timoj, ĉiuj duboj malaperis subite kaj plene tuj de la unua momento de malfermo de la kongreso! Post la unuaj vortoj de Ludoviko Zamenhof, potenca ondo de entuziasmo diskuris tra la tuta halo de la Bulonja Urba Teatro, plena de kongresanoj. La ĉeestantoj ne povis atendi finon de la parolado de la Majstro kaj interrompis ĝin ofte per laŭtaj, varmaj aplaŭdoj. Jes, en tiu ĉi momento triumfe realiĝis la ideo de la Lingvo Internacia: francoj, angloj, poloj, kanadanoj, meksikanoj eksentis ĉiuj samtempe, ke la lingvo, kiun parolas al ili Zamenhof, estas jam ilia lingvo, kvankam ili ellernis ĝin en plej diversaj kaj malproksimaj anguloj de la tero kaj kvankam multaj eble neniam ankoraŭ aŭdis ĝin parolatan! Ili eksentis veran, fortan ligilon inter si ĉiuj! Ili eksentis, ke en tiu momento la mondo, dispartigita en fremdajn, malamikajn, suspektajn hordojn, faris fortan, kuragan paŝon al tuthoma frateco!

En tiu glora festo internacia Zamenhof prave diris: „Unuan fojon en la homa historio ni, membroj de plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, sed

kiel fratoj, ĉar hodiaŭ kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj! Benata estu la Tago! Grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

En tiu tago Zamenhof estis plene rekom-pencita por sia longa multjara laboro, por la ofero de sia juneco, de sia tuta vivo al tiu nobla ideo.

(El „Historio de Esperanto 1887—1912“ de Adam Zakrzewski, VARSOVIO, 1979)

PENSOJ DE ZAMENHOF

„Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia“.

(Moto sur la unua paĝo de la Unua Libro)

„La Internacia Lingvo, same kiel ĉiu na-cia, estas socia propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi“.

(Dua paĝo de la Unua Libro).

„Sed mia lingvo havas ankoraŭ alian celon: nekontentigante je internacieco, ĝi devas an-koraŭ farigi tutmonda, t. e. atingi tion, ke la plejparto de la mondo scianta legi kaj skribi povu libere paroli ĝin“.

(El Antaŭparolo al la Unua Libro)

„Por mi persone estus kompreneble multe pli oportune teni la sorton de l'lingvo inter-nacia en miaj manoj. Tial, mi esperas, la leganto komprenos, ke kreinte la fundamenton de l'lingvo mi nun deponas de mi tutan aŭto-ritaton nur tial, ke mi profunde kredas, ke tion postulas la intereso de la afero. La tempo, mi esperas, montros, ke mi ne eraris“.

(El Antaŭparolo al la Dua Libro, Originala Verkaro, p. 36)

„Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo“.

(Originala Verkaro, p. 372)

SALUTO AL ZAMENHOF

Al ĉiuj popoloj benatan donacon
Vi faris trafante la vojon plej bonan:
En korojn de l'homoj eksemis vi pacon,
Sur illojn semante la lingvon belsonan.
Nun kreskas en mondo spirito homara
Kaj iom el via inspiro anima
Per ĉiu parolo de lingvo la kara
En koroj ekfloras al vivo senlima.

Edmond PRIVAT
(El juna verkaro)

Omage al la 75-jara jubileo de BEA en la Nacia Biblioteko „Cirilo kaj Metodij“ en oktobro j. k. estis aranĝita ekspozicio de Esperantaj libroj, periodaĵoj kaj dokumentoj. Ĝi estas rezulto de fruktodona kunlaboro inter BEA kaj la Nacia Biblioteko. Tio ne estas la unua komuna iniciato. Antaŭ iom pli ol 10 jaroj ĉi tie oni aranĝis ekspozicion, kiu prezentis la atingojn de la E-eldonagado en Bulgario.

Ĉi-foje preskaŭ ĉiuj ekspoziciaĵoj apartenis al la Bulgara E-muzeo, escepte de leteroj de Zamenhof al bulgaraj esperantistoj kaj iuj aliaj ekspoziciaĵoj — propaĵoj de la esperantistoj Hristo Gorov, Belka Beleva, Siŝman Bočev, Ljuben Grozdanov, Dimitar Denčev, Krasimira Pankova k. a.

La ekspozicio konsistis el 16 vitroŝrankoj. En ili estis ekspoziciitaj leteroj de Zamenhof al bulgaraj esperantistoj, ege interesaj E-libroj kaj gazetoj, kiuj akompanis la unuajn paŝojn de la bulgara E-movado. Tie oni povis vidi la unuajn tri lernolibrojn de Esperanto por bulgaroj (de Miloslav Bogdanov — 1890, de Hristo Popov — 1895 kaj de Georgi Oreškov — 1900) kaj bibliografiajn raraĵojn kiel la gazeto „Lumo“ de 1907 — organo de Bulgara E-Ligo, „Rondiranto“ — la unua ilustrita monata revuo, kiu aperadis en Plovdiv (1902), „Trumpetisto“, aperanta en urbo Levski (1904), „Unua paŝo“ — eldono de intelekta rondo en Sofio (1906).

Grandan intereson provokis ankaŭ apartaj ekzempleroj de revuo „Esperanto-Junularo“ (1925) — organo de Gelnanta E-Uniigo en Bulgario (1929), de revuo Balkana Konkordo — organo de la balkanlandaj esperantistoj, de revuo „Balkana Laboristo“ — organo de la proletaj esperantistoj en Bulgario (1929). Entute en nia lando dum la 75-jara periodo aperadis pli ol 70 E-periodaĵoj.

Aliaj vitroŝrankoj de la ekspozicio estis dediĉitaj al la temoj: „Esperanto kaj pacbatalo“, „Esperanto kaj komunikado“, „Esperanto kaj teatro“, „Scienca literaturo“. En la fako „Soci-politika literaturo“ oni povis konstati, ke ĝis nun en Esperanto aperis du biografioj de Georgi Dimitrov (resp. de Stela Blagoeva kaj de Petra Radenkova), la raporto de Todor Jivkov antaŭ la 9-a, 11-a kaj 12-a kongresoj de BKP, la du konstitucioj post la Naŭa de Septembro 1944 k. a. Tie ĉi oni povis vidi ankaŭ faksimilon de la kovrilpaĝo de la fama raporto de Georgi Dimitrov antaŭ la VII Kongreso de Komunista Internacio (1936).

La bulgara belarta literaturo en Esperanto okupis kvin montrokestojn. En Esperanto aperis preskaŭ ĉiuj plej gravaj verkoj de nia belarta literaturo. Ĝis nun en Esperanto estas prezentitaj 301 bulgaraj aŭtoroj per 1241 titoloj, aperintaj en apartaj libroj aŭ en bulgaraj kaj eksterlandaj E-periodaĵoj.

Aldonita statistiko informis, ke plej ofte tradukataj en Esperanto bulgaraj aŭtoroj estis Ivan Vazov, Elin Pelin, Hristo Smirnovski, Nikola Vapcarov, Hristo Botev, Georgi Karaslavov. La fako por belarta literaturo originale verkita en Esperanto de bulgaraj aŭtoroj abundis je interesaĵoj, ne sufiĉe konataj, kiel la libroj de Hrista (Hr. Gorov): „Poemo de l'plugisto“, „Ĉe abismo“, „Du frontoj“, la libroj de M. Ljubin (Asen Grigorov): „Garbo“ (poezikolekto), „La himno“ (noveloj).

En la lasta montrokesto per kongresaj libroj, bultenoj kaj prospektaj estis prezentitaj la okazintaj internaciaj E-kongresoj en Bulgario: la 48-a kaj 63-a Universalaj Kongresoj de Esperanto, la 19-a kaj 34-a Kongresoj de TEJO kaj la 20-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervojista E-Federacio).

La inaŭguro de la ekspozicio ĉeestis dekoj da sofiaj esperantistoj kaj civitanoj. La solenaj malfermis Vladimir Popov, vicdirektoro de la Nacia Biblioteko „Cirilo kaj Metodij“. Li dankis la klopodojn de la bulgaraj esperantistoj kompletigi la liston de iuj mankantaj en la Biblioteko E-eldonaĵoj. Li promesis estontan kunlaboron. Kunco Valev, ĝenerala sekretario de BEA, malfermis la ekspozicion per emocia parolado.

La ekspozicio de Esperantaj libroj, periodaĵoj kaj dokumentoj altiris la atenton de multaj vizitantoj de la Nacia Biblioteko „Cirilo kaj Metodij“.

Evgeni GEORGIEV

ANONCO

Antaŭstaras la verkado de „Historio de Esperanto-movado en la faŝistaj malliberejoj dum la periodo 1923—1944“. Oni petas ĉiujn esperantistojn kiuj estis en malliberejoj, koncentrejoj, kaj policejoj dum tiu periodo, skribi detale kaj konkrete siajn rememorojn kaj sendi ilin al adreso: Canko Ignev, ul. „Ĥaĝi Dimitar“ 17, Sofio 1000, ne pli malfrue ol en marto 1983. Estas dezirinde, ke oni sendu ankaŭ dokumentojn, fotojn kaj aliajn materialojn, kiujn oni resendas al la posedantoj post la uzo.

La Redakcio

La Dua Nacia Konferenco pri la problemoj de la esperanta instruista laboro pasis en vigla kaj disputa atmosfero. En la antaŭvespero de la nova lernojaro — je la 7-a de septembro — en la kinosalono de 18-a Unueca Politeknika Mezlernejo „Cirilo kaj Metodjo“ kunvenis ĉirkaŭ cent instruistoj de Esperanto el la tuta lando por interŝangi opiniojn pri lingvaj kaj pedagogiaj problemoj, por dividi profesion sperton.

Per unuminuta silento la ĉeestantoj honoris la memoron de Vasil Bozarov — eksprezidanto de la Instruista Sekcio ĉe BEA. En la nomo de la Buroo de CE de BEA la konferencon salutis Petar Todorov — vicprezidanto de CE de BEA.

En la baza raporto de la konferenco la ĝenerala sekretario de CE de BEA — Kunĉo Valev, analize kaj detale komentis la plej gravajn momentojn el la organiza agado de la E-instruistoj. Marin Bacev — sekretario de la Instruista Sekcio kaj metodikisto ĉe BEA, parolis pri la neceseco ke la DE de BEA sendu regulan kaj detalan informon pri la organizado kaj aktivado de la E-kursoj. Interesaj estis la eldiroj de: Zahari Ivanov — organizanto de la kurslaboro en Sofia DE de BEA; Dimitar Haĝiev — prezidanto de Bulgara MEM-Komitato; Maria Nikolĉeva — instruistino de Esperanto en Pleven; Sterju Kukuŝev — instruisto de Esperanto en urbo Peŝtera, distrikto de Pazargik; Simeon Hesapĉiev — Sofio, konata kursgvidanto kaj Petko Arnauĉov — prezidanto de DE de BEA en Pazargik.

Dum la konferenco utilaj estis la metodikaj prelegoj de Kunĉo Valev kaj Marin Bacev. Agrablan impreson al la ĉeestantoj faris la modela leciono de Lili Sotirova el Plovdiv.

Jam pasis kelkaj monatoj de la lernojaro. Sed tamen ni memorigu pri iuj el la pli gravaj problemoj — ankaŭ por tiuj, kiuj ne estis en la salono de la konferenco.

En sia raporto Kunĉo Valev substrekis: „Post la komenco de fakultativa lernado de Esperanto estas tre utile krei en la lernejoj

E-klubojn de lernantoj, kiuj kluboj devas organizi korespondadon, renkontigojn kun esperantistoj, ekskursojn en Bulgario kaj en eksterlando kaj aliajn interesajn iniciatojn. Nun nia ĝenerala tasko estas la preparado de pli multaj kadroj. Por tiu ĉi celo oni devas uzi la feriojn. Ĉiu DE devas fari kartotekon de siaj instruistoj kaj observi ilian aktivadon.

En sia eldiro Zahari Ivanov proponis kunordigon de la laboro inter la E-kursoj el la ĝemelurboj kaj ĝemeldistriktoj, kio rezultigos reciprokajn gastadojn kaj internaciajn junularajn brigadojn.

Maria Nikolĉeva opinias, ke oni devas fondi distriktajn metodikajn unuigojn de la instruistoj-esperantistoj. Tiuj unuigoj devas helpi al la pli junaj E-instruistoj. La Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica devas malfermi siajn pordojn ankaŭ por la lernantoj.

Mallonga informo pri la lernado de la Internacia Lingvo dum la pasinta lernojaro:

- ĝenerale Esperanton lernis ĉirkaŭ 1600 personoj, organizitaj en 100 kursoj

- el ili 28 estis en la mezlernejoj, kie lernis ĉirkaŭ 640 ĝelernantoj

- ĉe la preparado de instruistoj plej bone sin prezentis la estraroj de BEA en Sofio kaj en la distriktoj de Sofio, Plovdiv, Pazargik, Veliko Tarnovo kaj Mihajlovgrad, progreson oni rimarkas ankaŭ en la distrikto de Gabrovo kaj en Varna

Ĉio ĝis nun dirita estas la teoria flanko de la demando pri E-lernado. Ĉu la laboro de la Dua Nacia Konferenco de E-instruistoj estis sukcesa kaj utila, montros la rezultoj de la instruagado dum la kuranta jaro. Ilin ni raportos antaŭ la Tria Nacia Konferenco kaj tiam ni salutu nin ne nur per pli multaj preparitaj esperantistoj, sed ankaŭ per ili pli bona scio de la Internacia Lingvo!

Maria JANKOVA

Je la 24-a de julio en Antverpeno okazis kunsido de la Komisiono pri Virina Agado de UEA en kiu s-ino Anna Brennan raportis pri la agado de la komisiono dum 1981. Ŝi detale parolis pri la celoj de KVA: konigi al la monda esperantistaro la sociajn problemojn de la virinoj kaj helpadi al la esperantistinoj solvi tiujn ĉi problemojn; subteni aktivajn kontaktojn kun naciaj virinaj asocioj; plimultipli la nombron de la virinoj en la Esperanto-movado kaj plivigligi ilian aktivadon.

KVA popularigas la aktivadon de la virinoj, kiuj ludas gravan rolon en la Esperanto-movado.

KVA organizas arkivon de materialoj pri virinoj kun la celo provizi materialon por prelegantoj. Estas dezirinde, ke la posedantoj de tiaj materialoj por tiu arkivo sendu ilin al la adreso de KVA ĉe UEA.

En sia raporto s-ino Brennan substrekiis, ke KVA organizis esperantan virinan grupon de kunlaborantoj el plej diversaj landoj, kiuj tre bone aktivadis por akiri pere de Esperanto urgajn respondojn al la demandoj de la enketo organizita fare de la japana ĵurnalo „Mainichi“. Tiu ĵurnalo dediĉis tutan paĝon al virinaj problemoj, kiel suplemento, sub la titolo: „Kiel virinoj pensas — internacia versio“. Tiu numero de la ĵurnalo estis sendita al 4 500 000 abonantoj. La Redakcio de la ĵurnalo ricevis multajn kuraĝigajn leterojn de legantoj, kiuj esprimis sian kontentecon pri tiu ĉi iniciato. La enketo pruvis, ke la virinoj en la tuta mondo nuntempe havas la samajn problemojn kaj malfacilaĵojn.

KVA planis organizi unusemajnan kurson je temo: „Publika parolado por virinoj“, kiun versajne oni okazigos en Bulgario la sekvontan jaron, antaŭ la 68-a Universala kongreso de Esperanto.

La 6-an kaj 7-an de marto ĉi-jare en Hamburgo, FRG, okazis kunsido de KVA. La partoprenintoj decidis prepari folion pri la historio de la Internacia Tago de Virinoj kaj pri ĝia festado en diversaj landoj.

La demandoj, kiujn starigis al mi KVA, nome „Kion signifas en via lando (aŭ por vi persone) virina agado? Kion signifas por vi virina agado en la E-movado?“ estas ege gravaj, ĉar la kompreno de virina agado estas malsimila por la virinoj el diversaj landoj kun malsamaj kulturoj. Tial estas necese kompari la ricevintajn opiniojn pri la celoj de la virina agado, por trovi la plej utilan formon de internacia E-kunlaboro. La Komisiono pri Virina Agado uzos la artikolon de nia samlandano Rajna Konstantinova pri la historio de la 8-a de Marto.

La virinoj el ĉiuj landoj devus krei kondiĉojn por pli fruktodona interkompreniĝo kaj kunlaborado, por plua plibonigo de ilia situacio en la socio.

Maria TAŠEVA

NOVA LITERATURA KONKURSO DE «BULGARA ESPERANTISTO»

La nova literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“ estas dediĉita al la 60-jara datreveno de la Septembra Ribelo 1923. Tiun ĉi datrevenon la bulgara popolo solene celebros dum la sekvonta jaro.

La konkurso rajtas partopreni ĉiu bulgara aŭ eksterlanda esperantisto per poezio (originala aŭ tradukita), prozo (nur originala: rakonto, rememoroj, eseoj, teatraĵetoj), muziko (sur originala aŭ tradukita teksto).

Ĉiuj verkoj devas esti ligitaj kun la temo de la konkurso. En ili oni devas priklari la heroajn kaj la kredon de la ribelinta popolo, ĝian volon starigi laboristan-kampanaron regotencon en Bulgario; senmaskigi la monarkofaŝismon kaj kapitalismon kiel subpremantajn, ekspluatantojn kaj ekzekutistojn de la popolamasoj; rakonti pri la reĝo de la ribelo tra la mondo, pri la indigno kaj protesto de la honestaj homoj en ĉiuj landoj defende al la batalantoj kaj la viktimoj (pli ol 30 000), pri ilia solidareco kaj morala kaj materiala helpo al ili; aparte emfazi la defendon fare de humanistoj kiel Rolland, Barbuse, Gorkij k. a.; prezenti la figurojn de fidelaj gefiloj ribelintaj kaj

unualoke la ravaĵn figurojn de Georgi Dimitrov kaj Vasil Kolarov — gvidantoj de la ribelo; substreki la signifon de la Septembra Ribelo kiel historia leciono por la laboruloj ne nur en Bulgario, sed ankaŭ tutmonde; montri la kontinuecon de la bataloj de la bulgara popolo kontraŭ la monarkofaŝismo kaj kapitalismo dum la periodo 1923—1944, ĝis la glora venko je la 9-a de septembro 1944 („Septembro estigis majon!“); substreki, ke plej aktiva partopreno en la konstruado de la socialismo en nia lando kaj alilande kaj senĉesa batalo defende al la tutmonda paco estas la plej digna plenumo de la testamentoj de septembranoj.

Limdato por sendi la konkursaĵojn: 31-a de majo 1983 (validas la poŝta stampo).

La konkursaĵojn oni subskribu per pseŭdonimo. La veran nomon kaj la adreson de la aŭtoro oni metu en malgrandan koverton kaj sendu kune kun la konkursaĵo.

Ĉion oni sendu al adreso: La redakcio de „Bulgara Esperantisto“, bul. Hristo Botev 97, 1303 Sofio.

Al amasa partopreno en la konkurso per altkvalitaj verkoj dediĉitaj al la glora Septembra Ribelo!

Fine de 1980 la administra fundamento de la agado de UEA en Afriko estis reviziita kaj kompletigita. Pruvo pri tio estas la ĝisdatigitaj adresaro kaj arkivo. Konforme al propono de la koncerna diskutgrupo en la 65-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo estis elektita lando por pli koncentrita agado. La restado de Ian D. Tarrant (Britio) en Kenjo kaj la preteco de Nino Vessella (Italio) funkcii kiel kontaktanto, faris Kenjon la unua lando por koncentrita agado. Dum 1981 aperis deko da anoncetoj pri Esperanto en la gazeto „Taifa“ (en svahila lingvo). La pli ol 100 leĝantoj, kiuj reagis, ricevis svahilingvan broŝuron (traduko de la libro „Por defendo de afrikaj kulturoj“), lernolibreton kaj personajn leterojn. Rezulte dekoj da kenjanoj devus esti nun lernantaj la Internacian Lingvon. Por stimuli ilin aperis en 1982 unu numero de „Kenja Bulteno“, kaj kun ĝi estis dissenditaj la lecionoj 1 ĝis 4 de svahila koresponda kurso. Temas pri la konata konciza anglalingva lernilo „Esperanto for beginners“ de M. C. Butler, adaptita por afrikanoj fare de Nino Vessella.

Meze de 1981 aperis bulteno en Esperanto, angla kaj franca lingvoj, kun titolo „Esperanto en Afriko“. Ĝi estis dissendita al ĉiuj disponeblaj adresoj. En tiu bulteno estis enketilo, kiu denove kaŭzis aktualigon de nia administrado, kaj per emfazaj demandoj pri „la valoro de Esperanto por Afriko“ kaj pri „via motivo lerni Esperanton“ donis informojn, uzeblajn, por plua laboro kaj motivado.

La rezulto estis interesa, fakte surpriza, ĉar multaj afrikanoj respondis la ĉi-suprajn demandojn per asertoj, kiuj perfekte kongruas kun la tezoj, subtenataj de TEJO kaj UEA kontraŭ „lingva kaj kultura superregado“. Dua numero de „Esperanto en Afriko“ ne aperis, sed ekde septembro 1982 nia kunlaboranto Germain Pirlot (Belgio) redaktas kelkajn paĝojn en la belga franclingva bulteno „L'esperanto en marche“ (Esperanto en marŝo). Ĝi jam de jaroj estis sendata al afrikaj franclingvaj parolantoj fare de la fidela prizorgantino s-ino Andrée Orsolini. Ĝi — almenaŭ la paĝoj, kiuj koncernas Afrikon kaj tutmondajn movadajn novaĵojn — eksperimente iros al vasta adresaro en Afriko por tri numeroj. Poste oni decidis pri eventuala daŭrigo de tiu informvojo.

La dua teritorio de koncentrita agado estis ekde 1982 kelkaj okcidentafrikaj landoj, iamaj francaj kolonioj. Afrikanoj, kiuj anoncis en la franclingva porafrika revuo „Bingo“, ke ili deziras korespondi, ricevis de Germain

Pirlot leteron, kiu atentigas pri Esperanto kaj ties kontaktigaj potencialoj. Denove dekoj da petoj por pli da informoj, dekoj da franclingvaj broŝuroj „Por defendo de afrikaj kulturoj“, dekoj da personaj leteroj, dekoj da novaj lernantoj. Ĉi-kaze la novuloj eklernis pere de franclingva koresponda kurso, kiun grandanime disponigis s-ino Ferez (Francio). Rezulte aperis klubeto en Abigano (Ebura Bordo).

Tria teritorio, jam delonge ĉeestanta en la E-movado, estas Madagaskaro. Ĉefe per la kontaktoj kun s-roj Rakotondravao kaj Randrianekena klarigis la rilatoj kun tiu landa E-movado. Estis eldonitaj de UEA Malagasa-Esperanta lingvogvidilo kaj Esperanta-Malagasa vortareto.

Estas ankaŭ aliaj landoj, kie kontaktoj burĝonas kaj povus promesi rikoltojn: Zambio (kie agadas s-roj Chitambi Kapungwe), Zairio (pri kio respondas s-ro K. Braet — Francio), Angolo (kie s-ro Eugeniu Mustea dum kvar jaroj instruis), Maŭricio (kie s-ro Serge Reverdin entuziasmis tutan aron da junaj homoj kaj kreis E-klubon), Maroko (kie izolitaj junaj esperantistoj klopodas komenci komunan agadon). . . Juna burundiano tradukas anglalingvan lernolibron de Butler en sian lingvon. Unuopuloj aperas ankaŭ en Nigerio, Kamerunio, Senegalio, Ruando, Bociano, Tunizio, Gibutio, Algerio ktp.

Per la mono de fondaĵo „Azio-Afriko“ dekoj da afrikaj esperantistoj ricevas la revuon „Esperanto“ de UEA, estas individuaj membroj de la Asocio (helpe de Fondaĵo Canuto), ricevas donace librojn por lerni kaj legi.

Hans BAKKER, Nederlando (el „Esperanto“, julio-aŭgusto 1982 — kun mallongigoj)

ESPERANTISTA SOLIDARECO

En la lastaj jaroj Universala Esperanto-Asocio aktive agas por disvastigo de Esperanto en Afriko. Multe da geesperantistoj subtenas tiun ĉi iniciaton konsciente, ke Esperanto ne nur devas esti nomata internacia lingvo, sed vere devas esti aplikata en la tuta mondo.

Mi ankaŭ decidis helpi la disvastigon de Esperanto en afrikaj landoj sen organizita landa E-movado. Por tiu celo mi pagos en 1983 la jarabonojn de revuo „Bulgara Esperantisto“ por kvin geesperantistoj el Afriko.

Se vi, karaj legantoj, deziras ankaŭ helpi la disvastigon de la Internacia lingvo en la „nigra“ kontinento per korespondado, sendado de libroj kaj revuoj, mi volonte disponigos al vi kelkdekojn da adresoj de afrikaj samideanoj.

Nikola NIKOLOV, k. p. 45
1090 Sofio, Bulgario

VERDAJ STELTOJ

NOVJARA ABIO

V. SUTEEV

Rigardis hodiaŭ matene la infanoj al la kalendaro kaj vidis, ke tie restis nur la lasta folio.

Morgaŭ estas Novjaro! Morgaŭ ili devas ornamu la Novjaraĵon! La ludiloj estos pretaj, sed ili ĉiam ankoraŭ ne havas abion. Decidis la infanoj skribi leteron al Avo Frosto, ke li sendu al ili abion el la densa arbaro — la plej belan kaj la plej sveltan abion.

Kaj jen kiam leteron skribis la infanoj:

Kara Avo Frosto!

Donacu al ni, ni petas, abion al la Novjaro!
La ludilojn ni mem preparos. La leteron transdonos al vi jen tiu ĉi Neĝohomo.

La infanoj

Poste ili tuj kuris en la korton por fari Neĝohomon.

Ĉiuj laboris komune — iuj ŝovelis neĝon, aliaj faris grandajn neĝbulojn...

Anstataŭ ĉapelo sur la kapon de la Neĝohomo ili metis malnovan sitelon, la okulojn faris el karbopecetoj kaj anstataŭ nazo alpikis karoton.

Finfine la Neĝohomo estis preta — bela Neĝohomo-leterportisto!

La infanoj donis al li sian leteron kaj diris:

Neĝohomo, Neĝohomo,
Brava Neĝohomo-leterportisto,
En la malluman arbaron vi iru,
Nian leteron alportu.
Avo Frosto la leteron prenos
Kaj en la arbaro trovos
Abieton plej belan,
En verdaj pingloj vestitan.
Tiu ĉi abion
Vi alportu pli rapide
Al ĉiuj infanoj!

Vesperigis, la infanoj hejmeniris, kaj la Neĝohomo pensas:

— Jen oni komisiis al mi laboron! Kien nun iri?

— Prenu min kun vi! — diris la hundeto Bobik. — Mi helpas al vi trovi la vojon.

— Vere, estos pli agrable se ni iros kunel — ekgojis la Neĝohomo. — Vi gardos min kaj atentus pri la vojo.

Longe iris la Neĝohomo kaj Bobik kaj fine atingis grandegan densan arbaron...

Kaj jen antaŭ ili aperis Leporo.

— Kie loĝas Avo Frosto? — demandis ĝin la Neĝohomo.

Sed la Leporo ne havis tempon por respondi, ĉar ĝin persekutis la Vulpo.

Bobik ekbojis kaj ankaŭ sin ĵetis post la Leporo.

Ĉagrenigis la Neĝohomo:

— Evidente mi devas iri sola plue.

Subite ekestis neĝblovado...

Ektremis la Neĝohomo kaj... la ventego disblovis ĝin... Sur la neĝo restis nur la sitelo, la letero kaj la karoto.

Alkuris denove la Vulpo, tre kolera:

— Kie estas tiu ĉi, kiu malhelpis al mi atingi la Leporon?

Sed ĉirkaŭe estis neniu, nur la letero kuŝis sur la neĝo. Ĝi kaptis la leteron kaj forkuris.

Tiam revenis sur la loko Bobik:

— Kie estas la Neĝohomo?

Sed la Neĝohomo ne estis videbla.

En la sama tempo Lupo postkuris la Vulpon.

— Kion vi portas, he Vulpo? — ekhurlis la Lupo. — Donu la duonon!

— Mi ne donos, al mi mem ĝi estas necesa, — diris la Vulpo kaj ekkuris.

La Lupo — post ĝin.

Kaj la scivolema pigo ekflugis post ilin.



Bobik ploras, kaj la leporoj diras al ĝi: — Vi tion meritis: alifoje ne postkuru, ne timigu nin!...

— Mi ne postkuros, ne timigos vin, — diris Bobik kaj ankoraŭ pli laŭte ekploris.

— Ne ploru, ni helpas vin, — diris la leporoj.

— Kaj ni helpas al la leporoj, — diris la sciuroj.

La leporoj komencis fari novan Neĝhomon kaj la sciuroj helpis ilin: per la manetoj tuŝetas, per la vostetoj svinge blovetas.

Sur lia kapo ili denove metis la sitelon, faris la okulojn el karbopecetoj kaj nazon-karoton.

— Dankon, — diris la Neĝhomo, — ke vi denove faris min. — Kaj nun helpu al mi trovi Avo Froston.

Oni kondukis lin al la Urso. La Urso dormis en sia kuŝejo — oni pene povis veki ĝin.

Rakontis al ĝi la Neĝhomo, ke la infanoj sendis lin porti leteron al Avo Frosto.

— Letero? — ekmugis la Urso. — Kie estas ĝi?

Sed la letero mankis.

— Sen la letero Avo Frosto ne donos al vi la Novjara abion, — diris la Urso. — Pli bone vi reveni hejmen, kaj mi akompanos vin.

Neatendite alflugis la Pigo kaj ekgrakis:

— Jen estas la letero! Jen estas la letero!

Ciuj ekiris kun la letero al Avo Frosto.

La Neĝhomo rapidas, timas malfruigi: jen de altaĵo malsuprenruliĝas, jen en kavon falas, jen alproĉiĝas je stumpo.

Bone ke la Urso helpis lin, alie la Neĝhomo denove disfalus.

Fine ili alvenis al Avo Frosto.

Legis Avo Frosto la leteron kaj diris:

— Kial vi venis tiom malfrue? Ne sukcesos vi, Neĝhomo, alporti al la infanoj la Novjara abion.

Tiam ĉiuj komencis pravigi la Neĝhomon, rakontis kio okazis al li. Avo Frosto donis al li sian glitveturilon, kaj la Neĝhomo tuj ekveturis kun la Novjara abio al la infanoj.

La Urso revenis al sia kuŝejo — por dormi ĝis la printempo mem.

La sekvan matenon la Neĝhomo estis sur la sama loko en la korto, sed en liaj manoj anstataŭ letero estis la Novjara abio.

El la rusa: L. KUŝOVALIEVA

POR VIA NOVJARA MANĜOTABLO KAJ BONHUMORO

MELEAGRO KUN ACIDA BRASIKO

Produktaj: Unu meleagro, unu brasiko (fermentinta), nigra pipro, kumino, salo, du pecoj da ŝinko.

Por la farĉo: 2 tetasoj da riso, 50 gramoj da butero, la tripaĵoj — pecetigitaj kaj kuiritaj, 2 tetasoj de la buljono, tetaso da bone kuiritaj kaj senŝeligitaj kaŝtanoj, du acidaj pomoj, senŝeligitaj kaj pecetigitaj, 2 supkuleraj da sekvino, ruĝa pipro, petroselo kaj salo.

Preparo: Oni lavas la meleagron, sekigas per pura tuko kaj salas ĝin.

Farĉo: Oni fritas la rison en la butero, aldonas la salon kaj la buljonon de la kuiritaj tripaĵoj. Oni stufas ĉion ĉi, poste deprenas de la fajro, intermiksas kun la ceteraj produktoj por la farĉo, farĉas la meleagron, kunkudras kaj metas ĝin sur la pecetigitan brasikon, kovante per la du pecoj da ŝinko, kaj bakas ĝin ĝis ruĝiĝo. De tempo al tempo oni intermiksas la brasikon, por ke ĝi ne bruldifektigu. Post elpreno el la forno oni spicas ĝin per nigra pipro kaj per pistita kumino.

Oni proponas la viandon garnitan per farĉaĵo kaj brasiko.

DOLĈAĴO KUN KUKURBO

Oni rasperas 1,5 kg da kukurbo, aldonas 2 tekulerojn da cinamo, raspitan citronŝelon kaj 2—3 supkulerajn da sukero.

Aparte oni knedas paston el 1 tetaso da grio, 1 tetaso da faruno, en kiu oni anticipe aldonas 1 bakpulvoron kaj tetason da sukero. Oni fandas 2—3 supkulerajn da butero kaj ŝmiras la fundon de la elektrokaserolo. Oni dividas la paston kaj la farĉaĵon je tri egalaj partoj. Oni konsekvence elverŝas en la kaserolon parton de la pasto, raspitan kukurbon, denove tavolon de la pasto kaj sur ĝi — la restaĵon de la kukurbo. Oni surverŝas la bakajon per 2—3 supkulerajn da fandita butero, kovras la elektrokaserolon per la kovrilo kaj funkciigas ĝin. La pretan pudington oni laŭdezire surŝutas per pistitaj nuktoj kaj pecetigitaj sekvino.



— Pardonu, ĉu vi havas la libron „LA VIRO, KIU REGAS SUPER LA VIRINOJ“?

— Pri fabeloj kaj aliaj fantastaj verkoj bonvolu interesiĝi ĉe la alia flanko!

DUA NACIA KONFERENCO DE BULGARAJ FERVOJISTOJ

Je la 9-a kaj 10-a de oktobro 1982 en urbo Plovdiv okazis la dua konferenco de la Bulgara Fervojista Esperantista Sekcio. En ĝi partoprenis delegitoj de la du fervojistaj esperantistaj societoj en Sofio — „Prospero“ kaj „Hristo Botev“, el urboj Plovdiv, Burgas, Stara Zagora, Nova Zagora, Gorna Orjahovica, Miĥajlovgrad, Velingrad, Gabrovo, Jambol, Srednogiegorie k. a. el la tuta lando — ĉirkaŭ 60 personoj.

Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de BEA — la vicprezidanto k-do Petar Todčrov, k-do Kr. Karucin — respondeculo pri la fervojista Esperanto-sekcio, la honora membro de Bulgara Fervojista E-Sekcio G. Delapčiev, k-ino Kurteva el la DE en urbo Plovdiv k. a. La konferenco estis dediĉita al la 36-a Tutmonda Fervojista E-kongreso okazonta en Bulgario en 1984 en urbo Burgas — „Slančev Brjag“ („Suna Bordo“).

Prelegon pri la unujara aktivaĵo de la sekcio faris la prezidanto s-no Marin Marinov, kaj finanĉan raporton — la kasistino s-ino Adriana Georgieva.

Estis prezentitaj la estontaj taskoj lige kun la kongreso. S-no Marinov klare kaj kategorie substrektis la intereson, kiun manifestas la eksterlandaj esperantistoj pri nia kongreso, kiun ili atendas kun granda malpacience. Sed tio devigas la bulgarajn esperantistojn prepari sin serioze, precipe en lingva rilato.

Fine oni decidis, ke la sekvonta fervojista esperanta konferenco okazu en „Slančev Brjag“, kie estos la kongreso en 1984.

La laboro de la konferenco pasis bone.

La eldiroj sekvis unu post la alia, nature, saturitaj de valoraj proponoj.

La dommastroj el Plovdiv estis sin preparintaj tre bone. Ili proponis al ni belegan literaturan programon, kiu surprizis ĉiujn.

VESPERO DE L' AMIKECO

Estas ĉiam ia specifa kaj neripetebla etoso en la kunvenoj de la Kultur-Informa Centro ĉe la Sofia Urba Estraro de BEA. Bone organizitaj, kun riĉenhavaj programoj, ili altiras la atenton de multaj sofiaj geesperantistoj.

„Vespero de l'amikeco“ — tiel estis nomata la kunveno okazinta je la 6-a de oktobro j. k. en la salono de la Laboristoj en la Sfero de Komerco. Ĝi estis vera amika renkontiĝo, ĉar ĝin partoprenis ne nur sofiaj esperantistoj, sed ankaŭ nia kara gasto el Ĉeĥoslovakio — la profesia muzikisto kaj komponisto Lubomir Ĥuf el urbo Ivanovica sur Ĥane.

Nia E-veterano Georgi Dikovski emociis plenumis sian versaĵon „Feliĉo“. Kunĉo Valev, Donĉo Ĥitrov kaj Belka Beleva traigis la raportojn kaj la saluleteron de docento Josif Portnoj el Soveta Kazahstano kaj de d-ro Detlev Blanke, partoprenintaj la Ĥienc-Praktikan Konferencon en Veliko Tarnovo okaze de la 75-jariĝo de BEA.

Estis plenumita enhavoriĉa belarta muzika programo el komponaĵoj de nia gasto Lubomir Ĥuf laŭ versaĵoj de nia elstara esperantista poetino Penka Batoeva. Niaj konataj kantistoj Katja Malamova, Dimitar Denĉev kaj Ivelina Kavrakova, akompanate sur piano de Katja Nejkova, denove montris sian artan majstrecon.

La bonhumoro de la vespero pliriĉigis Miĥail Cobanov per deklamado de humoraj versoj. Per la plenumo de sia propra komponaĵo laŭ versaĵoj de Asen Grigorov nia gasto Lubomir Ĥuf proponis al la partoprenintoj agrablajn surprizojn.

D. S. Ĥ.



Partoprenintoj en la konferenco

La konferencanoj havis la eblecon konatiĝi kun la vidindaĵoj de la urbo — por la celo estis organizita ekskurso per aŭtobuso kun sperta ekskursgvidantino.

En la interkona vespero partoprenis multaj gastoj. Ĝi estigis bonan kontakton kaj amikajn rilatojn inter geesperantistoj el tuta Bulgario.

Ĉiuj ĉeestantoj restis kun bonegaj impresoj pri la konferenco en Plovdiv!

Verka ŜTJAJNER

FESTO EN ĈEPELARE

Je la 24-a de septembro j. k. la esperantistoj kaj la civitanoj de Ĉepelare, distrikto Smoljan, solene celebris la 75-jaran jubileon de BEA kaj la komencon de la E-movado en la urbo. Gastis esperantistoj el Smoljan, Asenovgrad, Plovdiv kaj Sofio.

Dimitar Marev — prezidanto de la loka E-societo „Diĉo Petrov“, faris ampleksan raporton pri la E-movado en Bulgario, kiu per la lingvo de d-ro L. L. Zamenhof batalas por amikeco kaj paco inter la popoloj. En sia salutparolado Jivka Binĉeva — ĉefo de fako „Agitado kaj Propagando“ ĉe la Komitato de BKP — Ĉepelare — alte pritaksis la agadon de la esperantistoj el la urbo.

Jordan Jordanov — prezidanto de DE de BEA en Smoljan, parolis pri la sukcesa disvastiĝo de la Internacia Lingvo en Ĉepelare. Li distingis per jubileaj insignoj la veteranajn-esperantistojn: Kostadin Sarkov, Stojan Andonov, Taŝo kaj Kostadin Paĉegiev, Janko Kirjakov, Nikola Gjopsaliev, Valkan Stojĉev, Atanas Pepelanov k. a. En la nomo de la E-societoj en Ĉepelare, Smoljan kaj Plovdiv estis prezentitaj donacoj. La kantgrupo ĉe societo „Diĉo Petrov“ plenumis riĉan literaturan-muzikan programon.

Estis inaŭgurita memortabulo de Dimitar Marev, kiu bruligis la fajron de Esperanto en tiu bulgara regiono.

Matia DIĈEVA

Laŭ iniciato de la Kulturdomo de Industria Entreprenejo „Uspeh“, de E-societo „Ivan Vladkov“, de la Komunuma Komitato de la Patrolanda Fronto kaj de la Komunuma Komitato de la Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo, la 16-an kaj 17-an de oktobro 1982 en urbo Drjanovo estis organizita renkontigo de esperantistoj el la lando okaze de la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov, la 75-jara jubileo de BEA kaj la 40-jara datreveno de la fonda de la Patrolanda Fronto. Cesis pli ol 100 esperantistoj el Drjanovo, Sofio, Stara Zagora, Galabovo, Trojan, Trjavna, Gabrovo, Veliko Tarnovo, Gorna Orjakhovica, Polski Trambes, Pavlikeni kaj vilaĝo Daskot.

Ce la solena malfermo de la renkontigo la prezidanto de la loka E-societo Geno Manev parolis pri la fono de la granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov. Riĉan literaturan-muzikan programon plenumis la amatoraj aktoroj-junpioniroj el Drjanovo kaj Dimitrograd.

La 17-an de oktobro la gastoj vizitis Varbanovo-Dlagnja, kie metis florkronojn antaŭ la monumento de la pereintaj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj Varban Penev kaj Botjo Penev. Estis organizita ankaŭ vizito en la muzeo de Koljo Ficeto. Estis solene inaŭgurita la nova klubejo de E-societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo. La klubejo disponigas bonajn kondiĉojn por seriozaj okupoj, por instruado de Esperanto kaj por ripozo.

Ni gratulas al la esperantistoj el Drjanovo la novan klubejon kaj bondeziras al ili organizi novajn interesajn aranĝojn por propagando de la Internaci Lingvo.

Neli ABAĜIEVA

AMIKAJ KONTAKTOJ

En la komenco de la kuranta aro oni starigis amikajn kontaktojn inter kinoklubo „Eŭridika“ de DE de BEA — Smoljan, la E-sekcio de Medicinistoj kaj la Kinoklubo de Medicinistoj de la Domo de Kulturo en Plovdiv. La esperantistoj-kinoamatoroj el ambaŭ urboj renkontiĝas ofte. Ili organizas reciprokajn gastadojn kaj ekskursojn, interparolas, interŝanĝas sperton pri la lernado de la Internaci Lingvo kaj pri la kinoarto.

Je la 6-a de oktobro la membroj de kinoklubo „Eŭridika“ vizitis kunvenon de la esperantistoj-medicinistoj el Plovdiv, dediĉitan al la 75-jariĝo de BEA. La ĉeestantoj havis la eblecon vidi la filmojn „La strato“ kaj „Leteroj“, kreitajn de la membroj de kinoklubo „Eŭridika“ honore al la 100-jara jubileo de la naskiĝo de nia fama popola gvidanto Georgi Dimitrov.

Maria P.Č.Č.A.

HONORE AL LA GRANDA OKTOBRO

La 65-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio estis la festa okazo, kiu kunvenigis la 3-an de novembro en la salono de strato „Serdika“ 13 la ĉefurbajn esperantistojn. Pri la monda signifo de la epokofara evento parolis en sia raporto la prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov. Li rakontis pri la partopreno de la bulgaraj esperantistoj Georgi Miĥajlov kaj Petar Taŝkov en la Oktobra Revolucio.

La solena literatura-muzika programo komenciĝis per bone elektitaj plenumoj de la Floro de la Sofijaj Esperantistoj. Per junula vervo la lernantino Nadejda Bončeva — distingita per tria premio en la Vapcarov-recitalo, deklamis la versafon „Kredo“ de la granda bulgara poeto-revoluciulo. La solenaĵo finiĝis per la plenumoj de instrumenta trio en konsisto Joanna Strateva — violono, Elisaveta Arnaudova — aldo-violono, d-ro Filip Stojcev — gitaro kaj Dobrinka Jekova — solistino.

M. B.

OMAGE AL LA JUBILEO

Je la 29-a de oktobro la Plovdiva esperantistaro, kunveninte en la klubo de E-societo „Kulturo“, havis la eblecon aŭdi la prelegon de Ivan Sivarov pri la laboro de la Scienc-Praktika Konferenco „75 jarojn Bulgara Esperantista Asocio“ en Veliko Tarnovo.

Kun granda atento kaj intereso la aŭskultantoj trarigardis ĉiujn partojn de „Paĝoj el mia taglibro“ de la parolinto.

Poste Krestju Sofroniev rakontis pri la E-movado en Plovdiv dum la periodo 1900—1904, pri la unuaj E-pioniroj en Plovdiv kaj pri la fono de E-klubo „Stelo“.

IV. MATEV

PERSONO KUN GIGANTA KRESKO

(El letero al bulgara amiko)

Kara kamarado,

Mi ricevis la libron de Petra Radenkova „konciza biografio de Georgi Dimitrov“, kiun vi sendis al mi. Koran dankon! Mi tuj englutis ĝin — je unu sola spiro.

La unua impresio akلاميĝas per la vortoj: „Brave, bulgaraj kamaradoj, vi povas fieri kaj jubili! Estas vera triumfo! Tre grava, tre respondeca, tre necesa libro aperis en Esperanto!“

Kaj la dua impresio jam estas persona alkomunikigo al la temo, enhavo kaj etoso de la libro. Estas rememoroj. Por mi Georgi Dimitrov subite „el nenio“ ekstaris en sia tuta giganta kresko ĝuste en la jaro 1933. Ĝis hodiaŭ staras antaŭ mi tiu aŭdaca, frappe faliganta frazo: „Sed mi demandas vin, sinjoro prezidanto, en kiu lando la faŝistoj ne estas barbaroj kaj sovaĝuloj?“

Kaj de post 1933 mi jam pensis pri Georgi Dimitrov kiel pri nia soveta ŝtatanano, kiu anime kaj vorte batalis kune kun ni. Lia nomo ĉiam lumis kiel hela standardo.

Kaj mi nur povis miri, kial Georgi Dimitrov forlasis Moskvon kaj forveturis Bulgarijon? Ĉu al li estis malbone en Moskvo? Ĉu rusoj ne akceptis lin kiel sian familianon?

Sed trafinte en Bulgarijon al la 48-a Universala Kongreso en 1963, mi komprenis, ke tian landon, tian popolon oni rajtas ne forgesi, nek anstataŭi per io eĉ pli granda, impona kaj potenta, kia estas Moskvo kaj USSR kompare kun Sofio kaj Bulgario.

La rakontanto iris laŭ la grandaj ŝtataj feroj kaj internacia politiko. La persona vivo de Dimitrov plene forestas. Nu, certe, oni ne povas ĉirkaŭpreni la neamplekseblan...

La kreo de Bulgario kiel unu el la elstaraj ŝtatoj de la nuna mondo, estas atingo de la bulgara popolo kaj kontribuo de ties grandaj gefiloj, inter kiuj Georgi Dimitrov estas stelo de unua granda!

N. DANOVSJKI

MI INSTRUIS ESPERANTON

En 1979 mi finis la Internacian Kursejon en Burgas kaj ricevis diplomon de Esperanto-instruistino, t. e. la rajton oficiale instrui la lingvon.

Ci-jare en Pisanica mi instruis Esperanton la unuan fojon. Mi komprenas, ke tio estas granda honoro kaj respondeco. Ĉu mi sukcesis? Tion verŝajne povos diri miaj gelnantoj kaj estontaj instruistoj. Sed tamen kelkaj el ili fakte faris sufiĉe grandan progreson kaj komencis paroli.

Por estonto mi volas rimarki, ke devas esti kelkaj kondiĉoj, kiam oni invitas alilandanojn por instru.

Kvankam la kursejo estas internacia, sed tute egale plej multaj estas la bulgaroj. Kaj ĉiu instruisto devas scii pri tipaj bulgaraj malfacilaĵoj rilate al la lingvo: diferenco inter *hasas* kaj *estas*, akuzativo, ĉe prononco de sonoj kaj diferenco inter *al*, *de*, *el*. Se mi sciis pri tio de la komenco mem, verŝajne mi povus fari ĉion pli sukcese.

Fakte, en Pisanica estas bonegaj kondiĉoj por instrui Esperanton: bonaj lerneĉambroj, bonaj loĝ-kondiĉoj kaj ĉe pitoreska naturo povas helpi.

Mi kore kaj sincere dankas por la ebleco elprovi miajn fortojn en la Internacia Esperanto-Kursejo kaj same kore kaj sincere deziras grandajn sukcesojn al la bulgaraj gesperantistoj ne nur en produktado de altnivelaj instruistoj, sed ankaŭ en ilia ĉiutaga laboro por Esperanto, por paco kaj amikeco.

Valeria CVETKOVA,
Leningrado

GASTOJ EL FRATA RUMANIO

Ni la rumanaĵ esperantistoj, membroj de E-rondo „La Frateco“ el urbo Roman, dum nia restado en via lando estis akceptitaj korvarme kaj kun aparta afableco en ĉiuj urboj, kiujn ni vizitis — Sofio, Burgas, Varna.

Nia veturado tra Bulgario estis kiel sonĝo, kiu bedaŭrinde tro rapide pasis. Estis mirinda fakto, ke ĉiuj homoj, al kiuj ni turnis sin per diversaj demandoj, helpis nin afable kaj amike, ĉe oni povas diri, frate. Ni estas tre feliĉaj, ke la ekspozicio el karikaturoj kaj afiŝprojektoj, kiun ni aranĝis en Sofia E-klubejo, ĝuis la intereson de la publiko. La propono de Sofia estraro de BEA presi miajn afiŝojn lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto min kortuŝis.

Atinginte Burgas, ni konstatis surprize, ke nin atendis en la stacidomo kelkaj samideanoj.

Nia vizito en Bulgario finiĝis en Varna, kie nin bonvenigis ĉe la stacidomo Georgi Cvetkov — direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo en la urbo.

Tri tagojn ni ĝuis la „Orajn Sablojn“ kaj ekveturis hejmen tre kontentaj pro tio, ke nur dum kelkaj tagoj ni ekkonis ne nur diversajn partojn de Bulgario, sed plej grave — multajn bulgarajn samideanojn.

C. BARJOVEANU — urbo Roman,
Rumanio

VIGLA AKTIVADO DE KGS EN ANTVERPEN

S-ro Germain Pirlot el Belgio, kunlaboranto de la Kongresa Gazetara Servo en Antverpeno informas nin, ke la aktivado de KGS estis ege rezultodona. Laŭ ne plenaj statistikaj donitaĵoj al la komenco de septembro 1982 la rezultoj de la agado de KG estis:

- 3 televid-elsendoj de Radio-Télévision Belge (2 en nederlanda kaj 1 en franca lingvo)
- 22 radioelsendoj
- 59 artikoloj en nederlanda lingvo kun 25 fotoj — en flandraj ĵurnaloj
- 17 komunikoj en nederlanda lingvo
- 27 artikoloj en franca lingvo
- 11 komunikoj en franca lingvo

2 artikoloj en germana lingvo

1 artikolo en angla lingvo

1 komunikoj en angla lingvo

3 mencioj sur titoloj pagoj.

La antaŭa gvidantaro de la Kongresa Gazetara Servo ĉe-kape de s-ro Ivo Durwael, daŭrigas la esplorado de publikaĵoj pri la 67-a Universala E-Kongreso en Antverpeno kaj la subtenado de la jam starigitaj kontaktoj kun landaj kaj eksterlandaj gazetoj, radio- kaj televidstacioj kaj kun apartaj ĵurnalistoj, celante pluan firmigon de tiuj kontaktoj kaj disvastigon de Esperanto en tiu ĉi regiono de Eŭropo.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kore dankas al s-ro Pirlot por lia afableco disponi al ni tiun valoran informon kaj pro lia sindona kunlaborado en la Kongresa Gazetara Servo.

ESPERANTO EN BELGIA ELEMENTA LERNEJO

Tiun lernejaron, unuafoje en la Elementa Lernejo N. D. de la Paco (Namuro en Belgio) dank'al la nova juna direktoro sinjoro Deleuze, la 98 gelnantoj de la kvina jaro povis elekti la studon de Esperanto. La 29-an de septembro 1982 la instruisto de unua kurso estis mirigita nombri sur la benkoj 40 10-jarajn geknabojn tre entuziasmajn. Tio estas nova en Valonio, kaj ebligas esperi.

Amikaj samideanoj, bonvolu kuragigi tiun tro raran iniciaton, sendante multnombrajn bildkartojn al niaj junaj mondĉivitanoj.

Ecole Primaire N. D. de la Paix,
Route de Velaine,
B-5101 ERPENT — NAMUR
Belgio

NEDERLANDA E-KONGRESO

Dum la semajnofino de la 25-a ĝis la 27-a de februaro 1983 okazos la komuna Nederlanda Esperanta Kongreso en Driebergen, urbo apud Utrecht. Ĉar la venonta jaro estos la Internacia jaro pri Komuniko, la ĉefa temo estos komunikado; ĝin traktos kelkaj nederlandaj kaj eksterlandaj prelegantoj. Krome okazos la ĵarkunveno de diversaj nederlandaj esperantaj unuigoj, kaj interkona kaj arta vesperoj. Eksterlandaj kongresanoj pagos ne la program-kostojn, sed nur la restadokostojn, t. e. f 72, 50. Pliajn informojn aŭ aliĝilon bonvolu peti ĉe s-ro T. Boersma, Hoewegeweg 18, NL-8394 VR De Hoeve.

GERARD GERRITSE
Prienses Marijkestraat 6
NL-6566 AW Millingen aan
de Rijn

FESTO PRI BULGARAJ JUNPIONIROJ

En Celjabinska Palaco de Junpioniroj okazis solena kunsido, dediĉita al la naskiĝtago de la Dimitrova Junpionira Organizaĵo „Septemvrije“. Geknaboj el la Klubo de Internacia Amikeco rakontis pri la vivo kaj agado de Georgi Dimitrov, pri lia amikeco kun la bulgaraj kaj sovetaj pioniroj, pri kantoj, ludoj kaj ŝercoj de la bulgaraj infanoj. Ankaŭ okazis la konkurso: „Ĉu vi konas Bulgarian?“

Du knabinoj el Esperanto-klubo „Stelo de l'Espero“ rakontis pri la amika rilato de G. Dimitrov al la Internacia Lingvo, pri la laboro de bulgaraj junpioniroj sur la kampo de Esperanto.

La junaj partoprenantoj kaj la gastoj de la kunsido kun granda intereso foliumis kajerojn de „Bulgara Esperantisto“ kaj de aliaj Esperanto-revuoj.

V. Rojdestvenskij
Celjabinsk, USSR



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Genčo Cokarov (40-jara inĝeniero) — p. k. 66 — kun el, precipe kun USSR (Litovio, Latvio, Estonio). Eblas reciproke gastado.

Lasto Nikov — 1090 Sofio, p. k. 497 — pri „Stelo“ — internacia mono kaj „Internaciaj Esperanto-financaj rilatoj kun pristudlaboraj celoj.

Mariana Ivanova (20-jara) — vilaĝo Granica, Kjustendilski okrag, str. „Georgi Dimitrov“ 13 — kun Eŭropaj landoj pri muziko, poezio, kino, ekspozicioj.

SOVETUNIO

Esperantistoj el Novgorod dez. kor. kun samideanoj el el, precipe el Bulgario. Komura adreso — USSR 173004, Novgorod, pr. Lenina, kv. 16, Ušakovu, G. M.:

— **Ušakov German M.** (49-jara ekonomiisto) — pri E-movado, turismo, sporto, naciaj demandoj kaj scienco;

— **Griškova Ljudmila A.** (34-jara komunikistino) — pri aŭtoturismo, E-movado kaj trikado;

— **Omsina Ljudmila V.** (46-jara medicinistino) — pri historio, turismo kaj E-movado;

— **Podsadnaja Ljudmila J.** (44-jara medicinistino) — pri arto, literaturo, medicino kaj E-movado;

— **Bolotin Vasilij J.** (33-jara medicinisto) — pri medicino, sporto, libroj, turismo kaj E-movado;

— **Bahvalkin Nikolaj V.** (30-jara teknikisto) — pri historio, radio kaj E-movado;

— **Ĥrustaljova Eugenia A.** (30-jara medicinistino) — pri turismo kaj libroj;

— **Ĥrustaljov Nikolaj** (32-jara geodezisto) — pri klasika gitaro kaj E-movado;

— **Fjodorova Nina T.** (42-jara medicinistino) — pri kantado kaj muziko;

— **Grigorjeva Nataša A.** (21-jara teknikisto) — pri literaturo, historio, muziko kaj kino.

Gesperantistoj el Haapsalu (Estonio) dez. kor. kun el pri et, kolektas PM kaj BK:

— **Lindla Ivar** (14-jara knabo) — str. Saare 9, SU-203170 Haapsalu, Est. SSR;

— **Poolamäe Tarmo** (14-jara knabo) — str. Toomingu 6, SU-203170, Haapsalu, Est. SSR;

— **Ristorg Erika** (25-jara fraŭlino) — str. Voidu 40-1, SU-203170, Haapsalu, Estona SSR.

NIAJ PERANTOJ

Britio, Covenham Louth, Lino. LN11 OPF „Laycroft“, Main Road, s-ro Paul Hewitt Jarabono: 2.50 f. ster.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ eg. valoro.

Ĉeĥoslovakio. 040 01 Košice, Šmermova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel Papak.

Danlando. Torholmsvej 26, 9800 Hjørring s-ro J. H. Eriksen

Postkonto 1 48 39 51

Jarabono: 37,98 kr. f.

Francio. F-54510 Tomblaine, B. P. 23,

s-ro Roger Degrelle

ĝirkonto 771.77 R, NANCY

Jarabono: 20 f. f.

Finnlando, PL 221, SF — 70101, Kuopio 10,

Finna Esperanto-librejo

Jarabono 24 fmk.

Germana Demokratia Respubliko,

108 Berlin, Charlottenstr. 60,

Der Esperantist

Centra Laborrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko,

Esperanto-Centro Humanismo

Roland H. Hegen,

Schlossgasse 30

D-6738 Elmstein

Jarabono: 8 gmk

Hispanio. Adonis Gonzalez Meana

str. Marcelino González, 5-4^a -doh.

Gijón (Asturias)

Jarabono: 300 pesetoj

Hungario, „Budapeŝta Informi“,

p. k. 153, H-1443 Budapest

Japanio

s-ro Yoshiaki Mizuno

327, Kitairiso

Sayama-shi,

Saitama-ken

350-13 JAPAN

s-ro Nanba Syōzi

Huruiti 3-13-26

Zyōtō-ku, Osaka

536 JAPAN

Jarabono: 5 us. dolaroj

aŭ egalvaloro

Kubo. Ciego de Avila,

apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz

Madagaskaro,

s-ro Justin Randriamampionona,

Lot: VA-20-BA Tsiadana

101, Antananarivo

Jarabono: 5 us. dol. (aŭ egalvaloro)

Malta, 20, Valletta Road,

Quormi,

s-ro Anthony Mercieca

Jarabono: 5 us. dolaroj (aŭ egalvaloro)

Pollando, ul. Piekna 16 b/g

PL — 00539 Warszawa,

s-ro Lech Kosieniak

Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao

Couto, 6 R/C, A P — 1500 Lisboa

Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio, 200016 Tallin, Estonio, do vostrebovanija

Johannes Palu

Jarabono: 5 rubloj

Svedio, Lingvägen 201,

S-12359 Farsta,

s-ro Tord Suård

Jarabono: 5 us. dolaroj (aŭ egalvaloro)

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

Sur la kovrilpaĝo:

Nega paradizo por skitistoj en Rila-montaro

SPORTO

BELECO, GRACIO, PERFEKTECO . . .

(III Eŭropa Ĉampioneco de Belarta Gimnastiko)



La admirindaj bulgaraj ĉampioninoj kune kun ilia trejnistino Neŝka Robeva.

Dum kvar tagoj la norvega urbo Stavanger estis centro de la juneco de Eŭropo. De la 28-a ĝis la 31-a de oktobro en la halo „Indrotø Hallen“ la reprezentantinoj de la plej virineca sporto — la belarta gimnastiko — en nobla batalo konkuris por la unuaj lokoj.

Fakte, en tiu ĉi eŭropa ĉampioneco, samkiel en ĉiuj antaŭaj mondiaj kaj eŭropaj ĉampionecoj, por la unuaj lokoj konkuris la gimnastinoj de la du „superaj skoloj“ — la bulgara kaj la sovetia. La sportistinoj el tiuj ĉi landoj evidente distingigis de la ceteraj partoprenantinoj laŭ stilo, majstreco kaj malfacileco de siaj ekzercoj. Al tiu ĉi alta nivelo eble proksimiĝas nur Bosanska (Ĉeĥoslovakio), Boĥo (Hispanio), Weber (FRG) kaj Korbust (Rumanio).

La specialistoj ne eraris, jam antaŭ la komenco de la ĉampioneco prognozante seriozan konkuradon inter la reprezentantinoj de Bulgario kaj Sovetunio. En la du lastaj ĉampionecoj — la Eŭropa en Amsterdamo kaj la Monda en Munkeno — la bulgarinoj estis ekster la konkurado. Sed nun jam de la unua tago evidentiĝis, ke la sovetaj sportistinoj konsiderinde malpliiĝis la diferencon en la nivelo de sia prezentado kaj ke dum la ĉampioneco en Stavanger ili havas ŝancon sukcese konkuri kun la bulgarinoj. Eble pro tio en Eŭropo por

la unua fojo estas du absolutaj ĉampioninoj — Anelia Ralenkova (Bulgario) kaj Dalia Kutkaite (USSR), kiuj en la kombinitaj ekzercoj atingis egalan nombron da poentoj — 39,40.

Tre interese pasis la konkurado en la apartaj ekzercoj. La plej bona triopo en Eŭropo kaj en la mondo — la bulgarinoj Anelia Ralenkova, Iljana Raeva kaj Lili Ignatova, konkuris kun la ambiciaj kaj posedantaj grandan majstrecon sovetaj gimnastinoj Dalia Kutkaite, Irina Devnina kaj Galina Beloglazova.

La mondĉampionino Ralenkova havis la malbonŝancon ludi tria laŭvice en la unua tago, kaj inter la lastaj — en la dua tago. Por ŝi tio ĉi estis aldona nerva kaj psika ŝarĝo kaj ŝi restis tria — post Dalia Kutkaite kaj Iljana Raeva, kiuj en tiu ĉi tago estis favoratinoj de la publiko. Iliaj ekzercoj — malfacilaj, elegantaj, fantaziplenaj kaj brile plenumitaj, provokis tondrajn aplaŭdojn en la halo.

Dum la dua tago Kutkaite sin prezentis bonege kaj senerece. Ankaŭ Raeva sin prezentis tre bone, sed ŝi cedis al la sovetia gimnastino per 0,05 poentoj. Tiu ĉi rezulto ŝajne decidis la sorton de la ĉampiona titolo en la kombinitaj ekzercoj. Sed ne por tiuj, kiuj bone konas Anelia Ralenkova. Ŝiaj ekzercoj — tre malfacilaj kaj virtuoza, fiksis la atenton de specialistoj, de spektantoj kaj juĝistoj. Post la ekzercoj kun ringo kaj ŝnureto ŝi atingis la rezulton de la sovetia gimnastino Kutkaite kaj tiamaniere ili ambaŭ estiĝis absolutaj eŭropaj ĉampioninoj. Tria estis Iljana Raeva.

La majstreco, la ambicio, la volo venki eĉ ĉe malbonŝanca loto alportis al Ralenkova sukceson egalan al heroaĵo, kaj la trejnistino de la bulgara teamo Neŝka Robeva diris per larmoplenaj okuloj: „... por la unua fojo mi komprenis, kion signifas konkuri sian teĥikon...“

Post la venko la Eŭropa ĉampionino Anelia Ralenkova diris: „Ni ĉiuj alvenis en Stavanger por konkuri por la unua loko. Al mi estas malfacile paroli. Feliĉe, mi sukcesis venki finfine. Nun mi estas multe pli ĝoja ol kiam mi gajnis la titolon de mondĉampionino en Munkeno. Kaj pli fiera, ĉar tiam la batalo por la ora medalo en la ĝenerala konkurado estis nur inter ni — la tri bulgarinoj. Ĉi-foje estis multe pli malfacile — ni havis ankoraŭ unu seriozan rivalinon — Kutkaite.“

Anelia Ralenkova defendis sian titolon de mondĉampionino ankaŭ en la konkuroj kun diversaj gimnastikiloj. Ŝi estis nekomparebla, nesuperebla. Ŝi „fandis“ la koron eĉ de la juĝistoj, kiuj por la unua fojo dum tiu ĉi ĉampioneco prijuĝis por ŝia plenumo kun ringo la maksimuman pritakson — 10 poentojn. Ora medalo por la ekzerco kun ringo, ora medalo — por la ekzerco kun ŝnureto kaj argenta medalo por la ekzerco kun mangrenado. La ĉampionino restis ĉampionino!

Iljana Raeva kaj Irina Devnina ne povis superi unu la alian kaj okupis la duan lokon en la ekzercoj kun ŝnureto, kaj la trian lokon en la ekzercoj kun mangrenado kaj ringo. En la ekzercoj kun rubando la oran medalon kun egala rezulto gajnis Lili Ignatova kaj Dalia Kutkaite.

Post ĉio vidita en Stavanger oni malfacile povus imagi, ke estas eble ankoraŭ pliperfektigi la ekzercojn de tiuj ĉi admirindaj junulinoj.

BOGDAN STEFANOV

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Vicĉefredaktoro: Ilaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI
prof. Vasil COČOV, Dimitar HĀGIEV, Krastju KARUCIN.

Administranto — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥirilo Botev 97,

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1000 Sofio

tel. 31-70-19

Presejo „Georgi Dimitrov“ (II bazo)